ISSN 0101-9201

CBPF - CENTRO BRASILEIRO DE PESQUISAS FÍSICAS
Rio de Janeiro

Notas de Física CBPF-NF-012/11
July 2011

La relativeca tempo – II
O tempo relativista – II

F.M. Paiva & A.F.F. Teixeira

Ministério da
Ciência e Tecnologia

La relativeca tempo – II
O tempo relativista – II

F.M. Paiva

Departamento de Física, Unidade Humaitá II, Colégio Pedro II

Rua Humaitá 80, 22261-040 Rio de Janeiro-RJ, Brasil; fmpaiva@cbpf.br

A.F.F. Teixeira

Centro Brasileiro de Pesquisas Físicas

22290-180 Rio de Janeiro-RJ, Brasil; teixeira@cbpf.br

8–a de julio, 2011

Resumo

La relativeca teorio montris ke pluraj Newtonaj ideoj pri la spacotempo estas malperfektaj. Tie ĉi ni prezentas kelkajn relativecajn konceptojn iel rilatajn al tiuj ideoj: samtempecon de eventoj kaj sinkronon de horloĝoj (ambaŭ laŭ linio en la spaca reto), gravitan Doppleran efikon, kaj vojaĝon kun reveno al estinto.

A teoria da relatividade mostrou que várias ideias Newtonianas sobre o espaçotempo são imperfeitas. Nós apresentamos aqui alguns conceitos relativistas de algum modo relacionados àquelas ideias: simultaneidade de eventos e sincronismo de relógios (ambos ao longo de uma linha na frama espacial), efeito Doppler gravitacional, e viagem ao passado.

1 Enkonduko

Antaŭa artiklo [1] prezentis kelkajn fizikajn efikojn montrante ke la Newtona tempo malsimilas al la tempo de speciala relativeco (SR). Tie ni diskutis pri Dopplera efiko, ĝemel-paradokso, rotacio, rigida stango, kaj konstanta propra akcelo. Por tio ni koordenatigis la spacotempon per inercia referencosistemo. Tiu sistemo taŭgas por fiziko sen gravito. Tamen se gravito gravas, ni bezonas uzi koordinatsistemojn pli ĝeneralajn, kiel tiu ĉi artiklo priskribas.

Ni komence klarigas la koncepton de normhorloĝo, de propra intertempo, kaj de

1 Introdução

Um artigo anterior [1] apresentou alguns efeitos físicos mostrando que o tempo Newtoniano é diferente do tempo da relatividade especial (RE). Ali nós discorremos sobre efeito Doppler, paradoxo dos gêmeos, rotação, barra rígida, e aceleração própria constante. Para tanto, nós coordenatizamos o espaçotempo usando um sistema inercial de referência. Esse sistema é apropriado para física sem gravitação. Entretanto, se a gravitação for importante, nós precisamos usar sistemas de coordenadas mais gerais, como este artigo descreve.

Nós inicialmente clarificamos o conceito de relógio padrão, de intertempo próprio, e de se-

sekundo; kaj ni emfazas la konstantecon de lumrapido en vakuo, en iu ajn gravito.

Normhorloĝo estas kiel altkvalita brakhorloĝo [1, Sek.1]. Ĉiuj normhorloĝoj estas *similaj*, tio signifante ke du apudaj normhorloĝoj montras la saman kadencon de fluo de iliaj tempoj. Tamen komence apudaj kaj sinkronaj normhorloĝoj, se poste havante malsimilajn rapidon kaj graviton, estos probable nesinkronaj en okaza renkonto. En la renkonto, la du normhorloĝoj ankoraŭ montras la saman kadencon de fluo de iliaj tempoj.

Normhorloĝo montras la fluon de τ, sia *propratempo*. Konvena unueco de *propra intertempo* $\Delta\tau$ estas la *sekundo*, kiu pendas nek de la movado de normhorloĝo nek de ĝia pozicio en gravita kampo. Estas interkonsentita ke sekundo estas la intertempo de senerare 9.192.631.770 periodoj de specifita radiado el atomo de cezio. Vidu [2, paĝo 18] por detaloj.

Ankaŭ estas interkonsentita [2, paĝo 17] ke la rapido c de lumo en vakuo estas senerare 299.792.458 m/s. Konsekvence, *metro* estas moderne difinita kiel la distanco ke lumo trakuras en vakuo dum frakcio 1/299.792.458 de sekundo, senerare.

Tiu ĉi artiklo akordas Einstein [3], Landau-Lifshitz [4], Anderson [5], Synge [6], Misner-Thorne-Wheeler [7]. Tamen, malsamaj vidpunktoj ekzistas, kiel tiu de Tonkinson [8], ekzemple.

gundo; e enfatizamos a constância da velocidade da luz no vácuo, em qualquer gravitação.

Um *relógio padrão* é como um relógio de pulso de qualidade superior [1, Sect.1]. Todos os relógios padrão são *iguais*, significando que dois deles, colocados muito próximos, mostram a mesma cadência no fluir dos seus tempos. Entretanto, relógios padrão inicialmente vizinhos e síncronos, se posteriormente submetidos a diferentes velocidades e gravitações, estarão provavelmente não-síncronos em um ocasional reencontro. No reencontro, os dois relógios ainda mostram a mesma cadência no fluir dos seus tempos.

Um relógio padrão mostra o fluir de τ, seu *tempo próprio*. Um unidade conveniente de *intertempo próprio* $\Delta\tau$ é o *segundo*, que independe tanto do movimento do relógio padrão como da localização dele em um campo gravitacional. Está postulado que 1 segundo é a exata duração de 9.192.631.770 períodos de uma especificada radiação de um átomo de césio. Veja [2, pág. 18] para detalhes.

Está também postulado [2, pág. 17] que a velocidade c da luz no vácuo é exatamente 299.792.458 m/s . Como consequência, o *metro* está modernamente definido como a distância que a luz percorre no vácuo durante a exata fração 1/299.792.458 de 1 segundo.

Este artigo vai de acordo com Einstein [3], Landau-Lifshitz [4], Anderson [5], Synge [6], Misner-Thorne-Wheeler [7]. Entretanto, há diferentes outros pontos de vista, como por exemplo o de Tonkinson [8].

2 Koordinatoj

Pensu pri *finhava regiono* $\mathcal{R}^3$ de trispaco; kaverno, ekzemple, eble havante graviton. Tie ni etendas (formale) aron de dudimensiaj surfacoj, kiel grandaj kurtenoj, kaj ni orde etiketas ilin per reelaj nombroj x^1. Tiuj surfacoj ĝeneraligas la karteziajn ebenojn x = konst de Euklida geometrio. Simile kiel tiuj ebenoj, surfacoj x^1 = konst ne tuŝas unu la alian, kaj ilia aro pleni-

2 Coordenadas

Considere uma *região finita* $\mathcal{R}^3$ do triespaço; uma gruta, por exemplo, possivelmente com gravitação. Nela nós estendemos (formalmente) um conjunto de superfícies bidimensionais, como grandes cortinas, e as etiquetamos ordenadamente mediante números reais x^1. Essas superfícies generalizam os planos cartesianos x = const da geometria Euclideana. Tal como aqueles planos, as superfícies x^1 = const não tocam gas regionon $\mathcal{R}^3$. Sed malsimile al karteziaj ebenoj, tiuj ĉi koordinatsurfacoj *povas malformiĝi* laŭlonge la tempo.

Ni simile etendas (formale) aliajn du arojn de dudimensiaj surfacoj, kaj etiketas ilin per reelaj nombroj x^2 = konst kaj x^3 = konst. Tiuj ĉi surfacoj ĝeneraligas la karteziajn ebenojn y = konst kaj z = konst. Tiel, tridimensia *spaca reto* estas elektita por $\mathcal{R}^3$. Ĉiu punkto P de la reto rilatas neambigue al triopo $x^i = [x^1, x^2, x^3]$. Ĉar la reto povas malformiĝi laŭlonge la tempo, tial distanco inter punktoj de reto povas ankaŭ varii.

Poste, ni fiksas (formale) unu horloĝon $\mathcal{K}_P$ en ĉiu punkto P de la reto; ĝi estas la *koordinathorloĝo* de P, aŭ *loka horloĝo* de P. Ĉiu $\mathcal{K}_P$ montras valoron *ĉiam pliegantan* de nedimensia variablo t, la *tempa koordinato* en P. $\mathcal{K}_P$ ne estas normhorloĝo, ordinare. Intervalo Δt de loka tempa koordinato estas apenaŭ nombro, sen unueco de intertempo (sed legu [9]). Ĉiu $\mathcal{K}_P$ havas sian kadencon de fluo de sia tempo t, kaj du koordinathorloĝoj ordinare ne estas sinkronaj, eĉ se ili estas najbaraj. Plu, ordinare estas malkonstanta, la rilato inter la fluo de t em $\mathcal{K}_P$ kaj la fluo de τ en normhorloĝo fiksita ĉe P.

Zorgo estas konsilinda, kiam ni altempigas ĉiun $\mathcal{K}_P$ en spaca reto: *najbaraj* lokaj horloĝoj devas montri valorojn de t ankaŭ najbaraj. Atentu, ke vojaĝanto en spaca reto povas renkonti serion de t pliegantan, aŭ senŝanĝantan, aŭ eĉ plietantan; Figuro 1 ekzemplas tiun eblecon.

Einstein nomis *molusko*, la spacotempan koordinatsistemon konstruitan kiel tie ĉi [10]. Kaj nomiĝas *evento*, io okazanta en konata punkto de spaco kaj en konata momento. En elektita molusko, evento E estas specifita per kvaropo $[t, x^1, x^2, x^3]$, aŭ ekvivalente per kvaropo $x^\mu := [x^0, x^i]$, estante $x^0 := ct$. Se ni elektas alian moluskon, la sama evento E estos specifita per

umas às outras, e seu conjunto preenche toda a região $\mathcal{R}^3$. Mas diferentemente daqueles planos, estas superfícies *podem se deformar* ao longo do tempo.

Nós igualmente estendemos (formalmente) outros dois conjuntos de superfícies bidimensionais, e os etiquetamos mediante números reais x^2 = const e x^3 = const. Estas superfícies generalizam os planos cartesianos y = const e z = const. Com isso, uma *rede espacial* tridimensional ficou escolhida para $\mathcal{R}^3$. Cada ponto P na rede corresponde sem ambiguidade a uma trinca $x^i = [x^1, x^2, x^3]$. Como a rede pode se deformar ao longo do tempo, a distância entre pontos da rede pode também variar.

Em seguida nós fixamos (formalmente) um relógio $\mathcal{K}_P$ em cada ponto P da rede; ele é o *relógio de coordenada* de P, ou *relógio local* de P. Um $\mathcal{K}_P$ mostra um valor *sempre crescente* de uma variável adimensional t, a *coordenada temporal* em P. Um $\mathcal{K}_P$ não é um relógio padrão, em geral. Um intervalo Δt de coordenada temporal local é apenas um número, desprovido de unidade (mas leia [9]). Cada $\mathcal{K}_P$ tem sua cadência de fluir de seu tempo t, e dois relógios de coordenada geralmente não estão síncronos, mesmo se forem vizinhos. Além disso, é geralmente variável, a razão entre o fluir de t em um $\mathcal{K}_P$ e o fluir de τ em um relógio padrão fixado em P.

Um cuidado é aconselhado, quando nós regulamos cada $\mathcal{K}_P$ na rede espacial: relógios locais *vizinhos* devem mostrar valores de t também vizinhos. Repare que um viajante na rede espacial pode encontrar série de t crescente, ou estacionário, ou mesmo decrescente; a Figura 1 exemplifica essa possibilidade.

Einstein chamou *molusco*, o sistema de coordenadas espaçotemporais construído como aqui [10]. E se chama *evento*, algo que aconteça em um conhecido ponto do espaço e em um momento conhecido. Em um molusco escolhido, um evento E é especificado por uma quádrupla $[t, x^1, x^2, x^3]$, ou equivalentemente pela quádrupla $x^\mu := [x^0, x^i]$, sendo $x^0 := ct$. Se escolhermos outro molusco, o mesmo evento E



Figuro 1: Normhorloĝo moviĝas en spaca reto. Ĝia propratempo ĉiam pligrandiĝas ($\tau = \ldots, 1, 2, 3, 4, 5, \ldots$), tamen la responda loka tempa koordinato ne ĉiam pligrandiĝas ($t = \ldots, 3, 4, 3, 2, 6, \ldots$).
Figura 1: Um relógio padrão se move na rede espacial. Seu tempo próprio sempre cresce ($\tau = \ldots, 1, 2, 3, 4, 5, \ldots$), embora a coordenada temporal local correspondente nem sempre cresça ($t = \ldots, 3, 4, 3, 2, 6, \ldots$).

alia kvaropo $x^{\mu'}$. Riskante negravan konfuzon kun t, ankaŭ x^0 estas nomita tempa koordinato de E.

Elekti moluskon, kiel ni ĵus faris, ne sufiĉas por priskribi kelkajn fizikajn variablojn. Ekzemple, priskribo de vektoro aŭ tensoro en evento E bezonas *vektoran bazon* en E. Ĉiu bazo taŭgas por specifi *komponojn* de vektoro aŭ tensoro. Konvenas ke bazoj en najbaraj eventoj malsimilu apenaŭ infinitezime. Tie ĉi ni uzos nur la plej bonkonatajn bazojn, la *koordinatbazojn*, kaj iliajn dualajn [11, paĝo 80]. Tiuj bazoj estas kreitaj ekde koordinatoj, sole. Tiel, ekde nun, la vorto molusko implicos uzadon de tiuj bazoj.

Indas sciiĝi ke ekzistas referencosistemoj kies koordinatoj ne estas videblaj kiel tiuj de molusko de Einstein: la nulaj koordinatoj, ekzemple. Tiuj anstataŭaj referencosistemoj simpligas kalkulojn en kelkaj specialaj fizikaj sistemoj, eĉ en speciala relativeco.

será especificado por outra quádrupla $x^{\mu'}$. Com desimportante risco de confusão com t, também x^0 é chamdo coordenada temporal de E.

Escolher um molusco, como acabamos de fazer, não basta para se descrever certas variáveis físicas. Por exemplo, a descrição de um vetor ou tensor em um evento E requer uma *base vetorial* em E. Uma base permite especificar as *componentes* do vetor ou tensor. Convém que bases de eventos vizinhos difiram apenas infinitesimamente. Nós aqui vamos usar unicamente as bases mais bem conhecidas, as *bases de coordenadas*, e suas duais [11, pág. 80]. Essas bases são criadas a partir das coordenadas, unicamente. Assim, a partir de agora, a palavra molusco implicará o uso dessas bases.

Convém saber que existem sistemas de referência cujas coordenadas não são como as de um molusco de Einstein: as coordenadas nulas, por exemplo. Esses sistemas de referência alternativos simplificam os cálculos em alguns sistemas físicos especiais, mesmo na relatividade especial.

3 Metriko

La spacaj koordinatoj de du punktoj en spaca reto informas se tiuj punktoj estas najbaraj (infinitezime), aŭ ne. Se tamen la punktoj ne estas najbaraj, tial la koordinatoj solaj ne informas la valoron de *finhava*

3 Métrica

As coordenadas espaciais de dois pontos em uma rede espacial informam se esses pontos são vizinhos (infinitesimamente), ou não. Se porém os pontos não forem vizinhos, as coordenadas sozinhas não informam o valor da separação *finita* distanco inter ili; t.e., koordinatoj ne povas diri ion kiel 'punkto A distancas $1m$ de punkto B'. Simile, tempaj koordinatoj de du samlokaj eventoj (tiuj kun samaj spacaj koordinatoj) informas se la eventoj estas tempe najbaraj, aŭ ne. Sed se samlokaj eventoj ne estas najbaraj, la koordinatoj ne informas la *finhavan* intertempon de procezo, ion kiel 'la procezo daŭras $1s$'. Tiaj informoj bezonas uzi *metrikon*.

Matematike, metrika kampo g estas tensora, simetria, de ordo 2. Se molusko estas elektita, la komponoj de g en evento E estas skribitaj $g_{\nu\rho}(E)$. Metriko oferas, krom alioj, la *linielementon* ds inter *najbaraj eventoj*. Tiel, estu $x^\mu = [ct, x^i\,]$ la koordinatoj de evento E, kie t estas montrata per loka horloĝo $\mathcal{K}_P$ de x^i; kaj estu $x^\mu + \mathrm{d}x^\mu = [c(t+\mathrm{d}t), x^i + \mathrm{d}x^i\,]$ la koordinatoj de alia evento $E + \mathrm{d}E$, najbara al E, estante $t + \mathrm{d}t$ montrata per loka horloĝo $\mathcal{K}_{P+\mathrm{d}P}$ de $x^i + \mathrm{d}x^i$. La linielemento ds rilatantan tiujn eventojn obeas [12]

entre eles; isto é, as coordenadas não podem dizer algo como 'o ponto A está $1m$ afastado do ponto B'. Igualmente, as coordenadas temporais de dois eventos colocais (aqueles com mesmas coordenadas espaciais) informam se os eventos são temporalmente vizinhos, ou não. Mas se os eventos colocais não forem vizinhos, as coordenadas não informam o intertempo *finito* de um processo, algo como 'o processo dura $1s$'. Essas informações precisam usar uma *métrica*.

Matematicamente, o campo métrico g é tensorial, simétrico, de ordem 2. Se um molusco foi escolhido, as componentes de g no evento E são escritas $g_{\nu\rho}(E)$. A métrica g propicia, além de outras coisas, o *elemento de linha* ds entre *eventos vizinhos*. Assim, sejam $x^\mu = [ct, x^i\,]$ as coordenadas de um evento E, onde t é mostrado pelo relógio local $\mathcal{K}_P$ de x^i; e sejam $x^\mu + \mathrm{d}x^\mu = [c(t+\mathrm{d}t), x^i + \mathrm{d}x^i\,]$ as coordenadas de outro evento $E+\mathrm{d}E$, vizinho a E, sendo $t+\mathrm{d}t$ mostrado pelo relógio local $\mathcal{K}_{P+\mathrm{d}P}$ de $x^i + \mathrm{d}x^i$. O elemento de linha ds que relaciona esses eventos obedece [12]

$$\mathrm{d}s := \sqrt{\epsilon\, g_{\mu\nu}(E)\,\mathrm{d}x^\mu\,\mathrm{d}x^\nu}\,, \qquad \mu,\nu = 0,1,2,3\,, \quad \epsilon = \pm 1\,; \tag{1}$$

la signumo ϵ en (1) estas elektata sama al de $g_{\mu\nu}\,\mathrm{d}x^\mu\,\mathrm{d}x^\nu$, en ĉiu paro de eventoj.

Nek E nek $E + \mathrm{d}E$ estas kvarvektoroj. Sed dE estas infinitezima kvarvektoro, kun komponoj $\mathrm{d}x^\mu = [c\,\mathrm{d}t, \mathrm{d}x^i]$. Ĝi estas de tempa tipo, aŭ nula tipo, aŭ spaca tipo, se $g_{\mu\nu}\,\mathrm{d}x^\mu\,\mathrm{d}x^\nu > 0$, aŭ $= 0$, aŭ < 0, respektive.

Se dE estas de tempa tipo, tiuokaze

o sinal ϵ na (1) é escolhido igual ao de $g_{\mu\nu}\,\mathrm{d}x^\mu\,\mathrm{d}x^\nu$, em cada par de eventos.

Nem E nem $E + \mathrm{d}E$ são quadrivetores. Mas dE é um vetor infinitesimal, com componentes $\mathrm{d}x^\mu = [c\,\mathrm{d}t, \mathrm{d}x^i]$. Ele é do tipo tempo, ou do tipo nulo, ou do tipo espaço, conforme seja $g_{\mu\nu}\,\mathrm{d}x^\mu\,\mathrm{d}x^\nu > 0$, ou $= 0$, ou < 0, respectivamente.

Se dE for do tipo tempo, então

$$\mathrm{d}s = c\,\mathrm{d}\tau\,, \quad \epsilon = +1, \tag{2}$$

kie $\mathrm{d}\tau > 0$ estas propra intertempo mezurita per normhorloĝo iranta de iu evento al alia. Intervaloj de tempa tipo okazas en movado de materia korpo, kiu vojaĝas kun rapido plieta ol c.

Ekv. (2) ebligas havigi komponojn $g_{\nu\rho}$ en evento $x^\mu := [c\,t, x^i]$, per eksperimenta metodo. En tiu metodo, nur proprajn intertempojn estas mezuritaj. Ni ĵetas 10

onde $\mathrm{d}\tau > 0$ é o intertempo próprio medido por um relógio padrão que vá de um evento ao outro. Intervalos do tipo tempo ocorrem no movimento de um corpo material, que viaja com velocidade menor que c.

A (2) permite obter-se as componentes $g_{\nu\rho}$ em um evento $x^\mu := [c\,t, x^i]$, por método empírico. Nesse método, somente intertempos próprios são medidos. Nós atiramos 10 relógios padrão a normhorloĝojn ekde punkto x^i, en loka momento t, en iuj ajn direktoj kaj kun iuj ajn rapidoj. Kiam la propratempo de ĉiu horloĝo h pliegiĝas de valoro $\Delta_h\tau$ sufiĉe malgranda, ni alnotas la tri spacajn koordinatojn $x^i+\Delta_h x^i$ de ĝia loko, kaj la montron $t+\Delta_h t$ de loka horloĝo. Simile kiel (1) kaj (2), ni skribas la 10 ekvaciojn

partir do ponto x^i, no momento local t, em direções quaisquer e com velocidades quaisquer. Quando o tempo próprio de cada relógio h tenha avançado um valor $\Delta_h\tau$ suficientemente pequeno, nós anotamos as três coordenadas espaciais $x^i+\Delta_h x^i$ do lugar onde ele está, e a leitura $t+\Delta_h t$ do relógio local. Como em (1) e (2), nós escrevemos as 10 equações

$$c^2(\Delta_h\tau)^2 = g_{\nu\rho}\Delta_h x^\nu \Delta_h x^\rho\,, \qquad h = 1, 2, ..., 10\,, \tag{3}$$

kaj solvas tiun sistemon de ne-homogenaj linearaj ekvacioj por la 10 koeficientoj $g_{\nu\rho}$ en evento x^μ.

Fakte, kompono g_{00} estas sciebla pli facile, en punkto x^i kaj en loka momento t. En tiu momento ni fiksas normhorloĝon apud la loka horloĝo de x^i. Uzante (1) kaj (2) kun $\mathrm{d}x^i = 0$, ni vidas ke la rilato inter la fluo de tempo de la du horloĝoj pendas nur de koeficiento g_{00} de metriko:

e resolvemos esse sistema de equações lineares inomogêneas para os 10 coeficientes $g_{\nu\rho}$ no evento x^μ.

Em verdade, a componente g_{00} pode ser conhecida mais facilmente, em um ponto x^i e num momento local t. Nesse momento nós fixamos um relógio padrão junto ao relógio local de x^i. Usando (1) e (2) com $\mathrm{d}x^i = 0$, vemos que a relação entre os andamentos dos dois relógios depende somente do coeficiente g_{00} da métrica:

$$\mathrm{d}\tau = \sqrt{g_{00}(t, x^i)}\,\mathrm{d}t\,, \qquad x^i = \mathrm{konst}\,; \tag{4}$$

mezurante $\mathrm{d}\tau$ kaj $\mathrm{d}t$, oni havas $g_{00}(t, x^i)$.

Se $\mathrm{d}E$ estas de spaca tipo, tial neniu korpo aŭ lumradiado povas esti en ambaŭ eventoj E kaj $E+\mathrm{d}E$; tiuokaze oni difinas *propran distancon* inter la eventoj,

medindo $\mathrm{d}\tau$ e $\mathrm{d}t$, tem-se $g_{00}(t, x^i)$.

Se $\mathrm{d}E$ for do tipo espaço, então nenhum corpo ou raio de luz pode estar em ambos eventos E e $E+\mathrm{d}E$; neste caso define-se a *distância própria* entre os eventos

$$\mathrm{d}\lambda := \mathrm{d}s\,, \quad \epsilon = -1\,; \tag{5}$$

ĝi ne pendas de molusko.

Fine, se $\mathrm{d}E$ estas de nula tipo, tial $\mathrm{d}s = 0$, kaj do ambaŭ propra intertempo $\mathrm{d}\tau$ kaj propra distanco $\mathrm{d}\lambda$ estas nulaj. Intervalo de nula tipo okazas en movado kun rapido c, kiel tiu de lumo. En laboratorio, la matematika ($\mathrm{d}s = 0$) kaj eksperimenta praktikeco de lumo estas konvene profitita [13] por malkovri la koeficientojn $g_{\mu\nu}$ en elektita molusko.

ela não depende do molusco.

Finalmente, se $\mathrm{d}E$ for do tipo nulo, então $\mathrm{d}s = 0$, e portanto ambos intertempo próprio $\mathrm{d}\tau$ e distância própria $\mathrm{d}\lambda$ são nulos. Intervalo do tipo nulo ocorre no movimento com velocidade c, como o da luz. Num laboratório, a praticidade matemática ($\mathrm{d}s = 0$) e experimental da luz é convenientemente aproveitada [13] para se descobrir os coeficientes $g_{\mu\nu}$ no molusco escolhido.

4 dL kaj dT

La speciala kaj la ĝenerala relativeco konsideras kvardimensian spacotempon.

4 dL e dT

A relatividade especial e a geral pressupõem um espaçotempo quadridimensional. Entretan-

Tamen, nia homeco kutimigis nin percepti malkune la tempon kaj la spacon, en pli ordinaraj fenomenoj. Tio stimulas nin serĉi relativecajn kvantojn rilatante (tiel bone kiel estas ebla) al Newtonaj distanco kaj intertempo.

Propra distanco kaj propra intertempo ne estas la serĉataj kvantoj, ĉar $\mathrm{d}\lambda$ estas difinita nur se $\mathrm{d}E$ estas de spaca tipo, kaj $\mathrm{d}\tau$ estas difinita nur se $\mathrm{d}E$ estas de tempa tipo. Ni anticipas ke la serĉataj kvantoj estos trovitaj en speciala inercia molusko.

Komence ni difinu distancon $\mathrm{d}L$ inter *punktoj* P kaj $P + \mathrm{d}P$, najbaraj en spaca reto, en elektita momento. Ni procedas simile kiel en speciala relativeco. Ni eligas lumsignalon el punkto $P = x^i$, en loka momento t. Tiu signalo atingas punkton $P + \mathrm{d}P = x^i + \mathrm{d}x^i$ en loka momento $t + \mathrm{d}_1 t$, kie $\mathrm{d}_1 t$ (kio estas $>$, $<$, aŭ $= 0$) estas solvo de $\mathrm{d}s = 0$:

to, nossa condição humana nos habituou a perceber separadamente o tempo e o espaço, nos fenômenos mais comuns. Isso nos estimula a buscar quantidades relativistas que correspondam (tão bem quanto possível) à distância e intertempo Newtonianos.

Distância própria e intertempo próprio não são as quantidades em busca, porque $\mathrm{d}\lambda$ é definido somente se $\mathrm{d}E$ for do tipo espaço, e $\mathrm{d}\tau$ é definido somente se $\mathrm{d}E$ for do tipo tempo. Nós antecipamos que as quantidades em busca serão encontradas em um especial molusco inercial.

De começo vamos definir distância $\mathrm{d}L$ entre *pontos* P e $P + \mathrm{d}P$, vizinhos na *rede espacial*, em um momento escolhido. Nós procedemos como na relatividade especial. Nós emitimos um sinal luminoso do ponto $P = x^i$, no momento local t. Esse sinal atinge o ponto $P + \mathrm{d}P = x^i + \mathrm{d}x^i$ no momento local $t + \mathrm{d}_1 t$, onde $\mathrm{d}_1 t$ (que é ou positivo, ou negativo, ou nulo) é solução de $\mathrm{d}s = 0$:

$$g_{00}(c\,\mathrm{d}_1 t)^2 + 2g_{0i}(c\,\mathrm{d}_1 t)\mathrm{d}x^i + g_{ij}\mathrm{d}x^i\mathrm{d}x^j = 0\,, \tag{6}$$

do | portanto

$$\mathrm{d}_1 t = \frac{1}{c\sqrt{g_{00}}}\left(-h_i\mathrm{d}x^i + \epsilon_1\sqrt{h_{ij}\,\mathrm{d}x^i\mathrm{d}x^j}\right)\,, \tag{7}$$

kie | onde

$$\epsilon_1 := \pm 1\,,\quad h_i(x^\mu) := \frac{g_{0i}}{\sqrt{g_{00}}}\;,\quad h_{ij}(x^\mu) := \frac{g_{0i}g_{0j}}{g_{00}} - g_{ij}\,. \tag{8}$$

La signalo reflektas de $P + \mathrm{d}P$ en loka momento $(t + \mathrm{d}_1 t)$, kaj revenas al P en loka momento $(t + \mathrm{d}_1 t) + \mathrm{d}_2 t$, kie $\mathrm{d}_2 t$ (kio ankaŭ estas $>$, $<$, aŭ $= 0$) ankaŭ estas solvo de $\mathrm{d}s = 0$:

O sinal reflete de $P + \mathrm{d}P$ no momento local $(t + \mathrm{d}_1 t)$, e retorna a P no momento local $(t + \mathrm{d}_1 t) + \mathrm{d}_2 t$, onde $\mathrm{d}_2 t$ (que também é positivo, ou negativo, ou nulo) é também solução de $\mathrm{d}s = 0$:

$$g_{00}(c\,\mathrm{d}_2 t)^2 - 2g_{0i}(c\,\mathrm{d}_2 t)\mathrm{d}x^i + g_{ij}\mathrm{d}x^i\mathrm{d}x^j = 0\,, \tag{9}$$

do | portanto

$$\mathrm{d}_2 t = \frac{1}{c\sqrt{g_{00}}}\left(+h_i\mathrm{d}x^i + \epsilon_2\sqrt{h_{ij}\,\mathrm{d}x^i\mathrm{d}x^j}\right),\quad \epsilon_2 := \pm 1\,. \tag{10}$$

Inter la eligo de la signalo kaj la reveno, la montro de $\mathcal{K}_P$ pligrandiĝas de

Entre a emissão do sinal e o retorno, a marcação de $\mathcal{K}_P$ aumenta

$$\mathrm{d}_1t + \mathrm{d}_2t = \frac{\epsilon_1 + \epsilon_2}{c\sqrt{g_{00}}}\sqrt{h_{ij}\,\mathrm{d}x^i\mathrm{d}x^j}\,; \tag{11}$$

certe $\mathrm{d}_1t + \mathrm{d}_2t > 0$, tial nur valoroj $\epsilon_1 = +1$ kaj $\epsilon_2 = +1$ validas en (11). Do, la propra intertempo $\mathrm{d}\tau$ pasita en P, inter eligo de signalo kaj reveno, rilatas al (4) kaj (11) kiel

certamente $\mathrm{d}_1t + \mathrm{d}_2t > 0$, portanto somente os valores $\epsilon_1 = +1$ e $\epsilon_2 = +1$ são válidos na (11). Assim, o intertempo próprio $\mathrm{d}\tau$ transcorrido em P, entre a partida do sinal e o retorno, se relaciona a (4) e (11) como

$$\mathrm{d}\tau = \sqrt{g_{00}}\,(\mathrm{d}_1t + \mathrm{d}_2t) = \frac{2}{c}\sqrt{h_{ij}\,\mathrm{d}x^i\mathrm{d}x^j}\,. \tag{12}$$

Ni difinas $\mathrm{d}L := c\,\mathrm{d}\tau/2$, t.e., la duono de spaco trakurita per lumsignalo, kun rapido c, dum tiu propra intertempo. Uzante (12) ni fine ricevas $\mathrm{d}L := \sqrt{h_{ij}\,\mathrm{d}x^i\mathrm{d}x^j}$.

Resume, la *distanco* inter du punktoj najbaraj en la reto estas

Nós definimos $\mathrm{d}L := c\,\mathrm{d}\tau/2$, ou seja, a metade do espaço percorrido pelo sinal luminoso, com velocidade c, durante esse intertempo próprio. Usando (12) temos finalmente $\mathrm{d}L := \sqrt{h_{ij}\,\mathrm{d}x^i\mathrm{d}x^j}$.

Em resumo, a *distância* entre dois pontos vizinhos na rede é

$$\mathrm{d}L := \sqrt{\left(\frac{g_{0i}g_{0j}}{g_{00}} - g_{ij}\right)\mathrm{d}x^i\mathrm{d}x^j}\,. \tag{13}$$

Ĉar la metrikaj koeficientoj ordinare varias kun t, tial ankaŭ la distancoj $\mathrm{d}L$ ordinare varias kun t. Kaj tiel kiel en Euklida geometrio, $\mathrm{d}L$ neniam estas negativa; kaj ĝi estas nula se nur la tri spacaj komponoj $\mathrm{d}x^i$ estas nulaj, t.e., se la punktoj P kaj $P + \mathrm{d}P$ koincidas.

Ekv. (13) difinas ankaŭ *distancon inter najbaraj eventoj*, en elektita molusko. Atentu ke $\mathrm{d}L$ ne pendas de diferenco $\mathrm{d}t$ inter la tempaj koordinatoj de eventoj. Tamen $\mathrm{d}L$ povas varii per ŝanĝo de molusko. Tiu fakto estas jam konita en speciala relativeco, per nomoj plivastiĝo (aŭ malplivastiĝo) de Lorentz.

Ni povas ricevi (13) per alia maniero [5, paĝo 348]: en evento E ni konstruas vektoron

Como os coeficientes métricos geralmente variam com t, também as distâncias $\mathrm{d}L$ geralmente variam com t. E tal como na geometria Euclideana, $\mathrm{d}L$ nunca é negativa; e ela é nula somente se as três componentes espaciais $\mathrm{d}x^i$ forem nulas, ou seja, se os pontos P e $P + \mathrm{d}P$ coincidirem.

A equação (13) define também *distância entre eventos vizinhos*, no molusco escolhido. Repare que $\mathrm{d}L$ não depende da diferença $\mathrm{d}t$ entre as coordenadas temporais dos eventos. Entretanto $\mathrm{d}L$ pode variar por mudança de molusco. Esse fato já é conhecido na relatividade especial, pelos nomes dilatação (ou contração) de Lorentz.

Podemos obter (13) por outra maneira [5, pág. 348]: em um evento E nós construímos o vetor

$$\tau^\mu := \delta^\mu_0/\sqrt{g_{00}}\,, \quad \tau_\mu = g_{0\mu}/\sqrt{g_{00}}\,; \tag{14}$$

ĝi estas de tempa tipo kaj unara ($\tau^\mu\tau_\mu = 1$), kaj celas estonton ($\tau^0 > 0$). Ni disigu

ele é do tipo tempo e unitário ($\tau^\mu\tau_\mu = 1$), e aponta para o futuro ($\tau^0 > 0$). Vamos decompor vektoron $\mathrm{d}x^\mu$ ĉe E per kompono $c\,\mathrm{d}T$ en direkto τ^μ, kaj kompono $\mathrm{d}L^\mu$ en hiperebeno orta al τ^μ:

um vetor $\mathrm{d}x^\mu$ locado em E em componente $c\,\mathrm{d}T$ na direção τ^μ, e componente $\mathrm{d}L^\mu$ no hiperplano normal a τ^μ:

$$\mathrm{d}x^\mu = c\,\mathrm{d}T\,\tau^\mu + \mathrm{d}L^\mu\,, \quad \tau_\mu \mathrm{d}L^\mu = 0\,; \tag{15}$$

tial $c\,\mathrm{d}T = \tau_\mu \mathrm{d}x^\mu$, kaj konsekvence

então $c\,\mathrm{d}T = \tau_\mu \mathrm{d}x^\mu$, e consequentemente

$$\mathrm{d}L^\mu = \mathrm{d}x^\mu - \tau^\mu \tau_\nu \mathrm{d}x^\nu = (\delta^\mu_\nu - \tau^\mu \tau_\nu)\mathrm{d}x^\nu\,. \tag{16}$$

Tiu $\mathrm{d}L^\mu$ estas kvarvektoro de spaca tipo, kies normo $g_{\mu\nu}\mathrm{d}L^\mu \mathrm{d}L^\nu$ estas $-(\mathrm{d}L)^2$. T.e.,

Esse $\mathrm{d}L^\mu$ é um quadrivetor do tipo espaço, cuja norma $g_{\mu\nu}\mathrm{d}L^\mu \mathrm{d}L^\nu$ é $-(\mathrm{d}L)^2$. Ou seja,

$$(\mathrm{d}L)^2 = (g_{0\mu} g_{0\nu}/g_{00} - g_{\mu\nu})\mathrm{d}x^\mu \mathrm{d}x^\nu\,; \tag{17}$$

ĉar nur $\mu = i$ kaj $\nu = j$ kontribuas al (17), tial ni rericevis (13).

Nun ni esploru $c\,\mathrm{d}T := \tau_\mu \mathrm{d}x^\mu$, t.e.,

como somente $\mu = i$ e $\nu = j$ contribuem para (17), nós reobtivemos (13).

Vamos agora explorar $c\,\mathrm{d}T := \tau_\mu \mathrm{d}x^\mu$, isto é,

$$\mathrm{d}T := \frac{g_{0\mu}\mathrm{d}x^\mu}{c\sqrt{g_{00}}}\,. \tag{18}$$

Ni diras ke $\mathrm{d}T$ estas *intertempo* de evento x^μ al evento $x^\mu + \mathrm{d}x^\mu$, en elektita molusko. Ĉar τ^μ celas estonton, tial $g_{0\mu}\mathrm{d}x^\mu$ pozitiva ($\mathrm{d}T > 0$) implicas ke evento $x^\mu + \mathrm{d}x^\mu$ estas tempe *posta* al evento x^μ, en tiu molusko. Klare, $g_{0\mu}\mathrm{d}x^\mu$ negativa implicas la malon. Kaj ni diras ke du najbaraj eventoj estas *samtempaj* se $g_{0\mu}\mathrm{d}x^\mu$ estas nula ($\mathrm{d}T = 0$), en tiu molusko.

Atentu ke signumo de $\mathrm{d}t$ ne estas decidiga, en tiuj difinoj. Fakte, evento $E + \mathrm{d}E$, supozita tempe posta al evento E, povas havi $\mathrm{d}t > 0$ aŭ $\mathrm{d}t = 0$ aŭ $\mathrm{d}t < 0$. Tio estas jam sugestita en Figuro 1. Ĉar $g_{0\mu}\mathrm{d}x^\mu \equiv \mathrm{d}x_0$, samtempeco estas pli kompakte esprimebla per $\mathrm{d}x_0 = 0$.

Atentu ankaŭ en (18) ke la intertempo $\mathrm{d}T$ pendas de spacaj komponoj $\mathrm{d}x^i$, sed ne pendas de nure spacaj metrikaj koeficientoj g_{ij}. Malsimile al propra intertempo $\mathrm{d}\tau$, kiu estas difinita nur se $\mathrm{d}x^\mu$ estas de tempa tipo, la intertempo $\mathrm{d}T$ estas difinita por $\mathrm{d}x^\mu$ de ia ajn tipo.

Simile kiel $\mathrm{d}L$, ankaŭ $\mathrm{d}T$ pendas de molusko. Atentu ankoraŭ ke

Dizemos que $\mathrm{d}T$ é o *intertempo* de um evento x^μ para um evento $x^\mu + \mathrm{d}x^\mu$, no molusco escolhido. Como τ^μ aponta para o futuro, então $g_{0\mu}\mathrm{d}x^\mu$ positivo ($\mathrm{d}T > 0$) implica o evento $x^\mu + \mathrm{d}x^\mu$ ser temporalmente *posterior* ao evento x^μ, nesse molusco. É claro que $g_{0\mu}\mathrm{d}x^\mu$ negativo implica o contrário. E dizemos que dois eventos vizinhos são *simultâneos* se $g_{0\mu}\mathrm{d}x^\mu$ for nulo ($\mathrm{d}T = 0$), nesse molusco.

Repare que o sinal de $\mathrm{d}t$ não é decisório, nessas definições. Com efeito, um evento $E + \mathrm{d}E$, suposto posterior a um evento E, pode ter tanto $\mathrm{d}t > 0$ como $\mathrm{d}t = 0$ ou $\mathrm{d}t < 0$. Isso já foi sugerido na Figura 1. Como $g_{0\mu}\mathrm{d}x^\mu \equiv \mathrm{d}x_0$, então a simultaneidade pode ser expressa mais compactamente por $\mathrm{d}x_0 = 0$.

Repare ainda na (18) que o intertempo $\mathrm{d}T$ depende das componentes espaciais $\mathrm{d}x^i$, porém não depende dos coeficientes métricos somente espaciais g_{ij}. Diferentemente do intertempo próprio $\mathrm{d}\tau$, que é definido somente se $\mathrm{d}x^\mu$ for do tipo tempo, o intertempo $\mathrm{d}T$ é definido para $\mathrm{d}x^\mu$ de qualquer tipo.

Semelhantemente a $\mathrm{d}L$, também $\mathrm{d}T$ depende do molusco. Repare ainda que

$$\epsilon(\mathrm{d}s)^2 = (c\,\mathrm{d}T)^2 - (\mathrm{d}L)^2\,. \tag{19}$$

Do, kvankam $\mathrm{d}T$ kaj $\mathrm{d}L$ pendas de molusko, ilia speciala kombino (19) ne pendas. La simileco de (19) kun analoga ekvacio en speciala relativeco ne estas akcidenta. Fakte, $\mathrm{d}T$ kaj $\mathrm{d}L$ estas intertempo kaj distanco inter najbaraj eventoj, mezuritaj en inercia referencosistemo fiksita en x^μ .

Se $\mathrm{d}x^\mu$ estas de *tempa tipo*, tial estas moluskoj kie la distanco $\mathrm{d}L'$ inter la eventoj estas nula (samlokaj eventoj); tial la propra intertempo $\mathrm{d}\tau$ estas la modulo de intertempo $\mathrm{d}T\,'$ mezurita en iu ajn el tiuj moluskoj. Sed se $\mathrm{d}x^\mu$ estas de *spaca tipo*, tial estas moluskoj kie la intertempo $\mathrm{d}T\,'$ estas nula (samtempaj eventoj); tial la propra distanco $\mathrm{d}\lambda$ estas la distanco $\mathrm{d}L'$ mezurita en iu ajn el tiuj moluskoj. Fine, se $\mathrm{d}x^\mu$ estas de *nula tipo*, tial $\mathrm{d}\tau$ kaj $\mathrm{d}\lambda$ estas nulaj. Sed $\mathrm{d}T$ kaj $\mathrm{d}L$ estas ne-nulaj, plue ili havas saman modulon ($|c\mathrm{d}T| = \mathrm{d}L$) , kies valoro pendas de molusko.

Assim, embora $\mathrm{d}T$ e $\mathrm{d}L$ dependam do molusco, a especial combinação deles (19) não depende. A semelhança da (19) com equação análoga na relatividade especial não é acidental. Na verdade, $\mathrm{d}T$ e $\mathrm{d}L$ são intertempo e distância entre eventos vizinhos, medidos em um sistema inercial de referência fixado em x^μ .

Se um intervalo $\mathrm{d}x^\mu$ for do *tipo tempo*, então existem moluscos nos quais a distância $\mathrm{d}L'$ entre os eventos é nula (eventos colocais); então o intertempo próprio $\mathrm{d}\tau$ é o módulo do intertempo $\mathrm{d}T\,'$ medido em algum desses moluscos. Porém se $\mathrm{d}x^\mu$ for do *tipo espaço*, então existem moluscos nos quais o intertempo $\mathrm{d}T\,'$ é nulo (eventos simultâneos); então a distância própria $\mathrm{d}\lambda$ é a distância $\mathrm{d}L'$ medida em algum desses moluscos. Finalmente, se $\mathrm{d}x^\mu$ for do *tipo nulo*, então o intertempo próprio $\mathrm{d}\tau$ e a distância própria $\mathrm{d}\lambda$ são nulos. Mas o intertempo $\mathrm{d}T$ e a distância $\mathrm{d}L$ não são nulos, ademais eles têm mesmo módulo ($|c\mathrm{d}T| = \mathrm{d}L$) , cujo valor depende do molusco.

5 Kelkaj rimarkoj

En difino (13), atentu ke *ĉiuj* 10 koeficientoj $g_{\mu\nu}$ kontribuas al $\mathrm{d}L$; kaj ĉar tiuj koeficientoj ordinare varias laŭ la tempo, la distanco $\mathrm{d}L$ inter punktoj najbaraj en la reto ankaŭ ordinare varias, tial la reto ordinare malformiĝas laŭ la tempo. Atentu ankaŭ ke ĉar $(g_{0i}\mathrm{d}x^i)(g_{0j}\mathrm{d}x^j) \geq 0$, tial la miksitaj komponoj g_{0i} de metriko, se ne-nulaj, ĉiam pligrandigas distancojn $\mathrm{d}L$.

Ĉar $h_{ij}\mathrm{d}x^i\mathrm{d}x^j$ en (12) estas ne-negativa por iuj ajn $\mathrm{d}x^i$, koeficientoj h_{ij} difinitaj en (8) obeas la $3+3+1 =\ 7$ neegalecojn [4, paĝo 236]

5 Algumas notas

Na definição (13), repare que *todos* os 10 coeficientes $g_{\mu\nu}$ da métrica contribuem para $\mathrm{d}L$; e como esses coeficientes geralmente variam com o tempo, a distância $\mathrm{d}L$ entre pontos vizinhos na rede também geralmente varia, daí a rede espacial geralmente se deforma ao longo do tempo. Repare também que como $(g_{0i}\mathrm{d}x^i)(g_{0j}\mathrm{d}x^j) \geq 0$, então as componentes mistas g_{0i} da métrica, se não-nulas, sempre aumentam as distâncias $\mathrm{d}L$.

Como $h_{ij}\mathrm{d}x^i\mathrm{d}x^j$ na (12) é não-negativo para quaisquer $\mathrm{d}x^i$, os coeficientes h_{ij} definidos na (8) cumprem as $3+3+1 =\ 7$ desigualdades [4, pág. 236]

$$h_{ii} > 0\,, \quad h_{ii}h_{jj} > (h_{ij})^2\,, \quad \det(h_{ij}) > 0\,. \tag{20}$$

Tiuj neegalecoj faras ke $\mathrm{d}L$ estu nula nur se la tri komponoj $\mathrm{d}x^i$ estas nulaj. Kaj uzante

Essas desigualdades fazem $\mathrm{d}L$ nulo somente se as três componentes $\mathrm{d}x^i$ forem nulas. E usando

h_{ij} de (8), kaj (20), ni vidas ke koeficientoj $g_{\mu\nu}$ obeas la $1+3+3+1=8$ neegalecojn

os h_{ij} da (8), e as (20), vemos que os coeficientes $g_{\mu\nu}$ cumprem as $1+3+3+1=8$ desigualdades

$$g_{00}>0\,,\quad g_{00}g_{ii}<(g_{0i})^2\,,$$
$$g_{00}(g_{ii}g_{jj}-g_{ij}^2)-g_{0i}(g_{0i}g_{jj}-g_{ij}g_{0j})-g_{0j}(g_{0j}g_{ii}-g_{0i}g_{ij})>0\,,\quad \det(g_{\mu\nu})<0\,. \tag{21}$$

Pro arbitra ŝanĝo de molusko, kvantoj h_{ij} , $g_{\mu\nu}$, kaj $\mathrm{d}x^\mu$ ordinare varias, en eventoj E kaj $E+\mathrm{d}E$. Ni povas demandi se la specialaj kombinoj (13) kaj (18) de tiuj kvantoj lasas ke $\mathrm{d}L$ kaj $\mathrm{d}T$ estu nevariantaj. Tiel kiel en speciala relativeco, respondo estas *ne*, ordinare.

Tamen, estas *specialaj* ŝanĝoj de molusko $[t,x^i]\to[t',x^{i'}]$ kiuj lasas ne-ŝanĝantaj *ĉiun* infiniteziman distancon $\mathrm{d}L$ kaj *ĉiun* infiniteziman intertempon $\mathrm{d}T$. En tiuj ŝanĝoj de molusko, spaciaj koordinatoj transformiĝas kiel $x^i\to x^{i'}(x^j)$. T.e., la ŝanĝo de iu spaca reto al la alia ne pendas de tempo. La responda tempa transformo povas esti ĝenerala, $t\to t'(t,x^i)$. Atentu ke la Lorentzaj transformoj por la spaca reto, uzataj en speciala relativeco, pendas de t ; ekzemple, $x\to x'=\gamma(x-vt/c)$. Bonkonate, tiuj transformoj malplivastigas la spacan reton.

Ni vidis ke $\mathrm{d}L:=\sqrt{h_{ij}\,\mathrm{d}x^i\mathrm{d}x^j}$ estas distanco inter punktoj najbaraj en spaca reto de elektita molusko. Se punktoj ne estas najbaraj, la finia distanco inter ili estas difinita per integralo de $\mathrm{d}L$ laŭ la geodezio unuiganta ilin, uzante h_{ij} kiel tridimensia metriko. Ĉar tiuj koeficientoj ordinare varias laŭ la tempo, ankaŭ la distanco ordinare varias.

Por mudança arbitrária de molusco, as quantidades h_{ij} , $g_{\mu\nu}$, e $\mathrm{d}x^\mu$ geralmente variam, nos eventos E e $E+\mathrm{d}E$. Podemos perguntar se as especiais combinações (13) e (18) dessas quantidades deixam $\mathrm{d}L$ e $\mathrm{d}T$ invariantes. Tal como na relatividade especial, a resposta é *não*, em geral.

Entretanto, existem *especiais* mudanças de molusco $[t,x^i]\to[t',x^{i'}]$ que deixam inalterados *toda* distância infinitesimal $\mathrm{d}L$ e *todo* intertempo infinitesimal $\mathrm{d}T$. Nessas mudanças de molusco, as coordenadas espaciais se transformam como $x^i\to x^{i'}(x^j)$. Ou seja, a mudança de uma rede espacial para a outra não depende do tempo. A correspondente transformação temporal pode ser geral, $t\to t'(t,x^i)$. Repare que as transformações de Lorentz para a rede espacial, usadas na relatividade especial, dependem de t ; por exemplo, $x\to x'=\gamma(x-vt/c)$. Como é bem sabido, essas transformações contraem a rede espacial.

Nós vimos que $\mathrm{d}L:=\sqrt{h_{ij}\,\mathrm{d}x^i\mathrm{d}x^j}$ é a distância entre pontos vizinhos na rede espacial do molusco escolhido. Se os pontos não forem vizinhos, a distância finita entre eles é definida como a integral de $\mathrm{d}L$ ao longo da geodésica que os une, usando-se h_{ij} como métrica tridimensional. Como esses coeficientes geralmente variam com o tempo, também as separações geralmente variam.

6 Rapido

Estu du najbaraj eventoj, kun koordinatoj x^μ kaj $x^\mu+\mathrm{d}x^\mu$ en iu molusko. Uzante $\mathrm{d}L$ kaj $\mathrm{d}T$, ni difinas *rapidon* rilatan al kvarvektoro $\mathrm{d}x^\mu$ per

6 Velocidade

Sejam dois eventos vizinhos, com coordenadas x^μ e $x^\mu+\mathrm{d}x^\mu$ em algum molusco. Usando $\mathrm{d}L$ e $\mathrm{d}T$, nós definimos uma *velocidade* associada ao vetor $\mathrm{d}x^\mu$ mediante

$$v:=\frac{\mathrm{d}L}{\mathrm{d}T}\,. \tag{22}$$

Klare, v pendas de molusko. Ĉar $\mathrm{d}L$ estas pozitiva, kaj $\mathrm{d}T$ povas esti aŭ pozitiva, aŭ nula, aŭ negativa, tial rapido (22) povas havi iun ajn valoron, $-\infty \leq v \leq \infty$. Okazas $v > 0$ se $\mathrm{d}T > 0$, t.e. se evento $x^\mu + \mathrm{d}x^\mu$ estas tempe posta evento x^μ (tial $g_{0\mu}\mathrm{d}x^\mu > 0$), kaj okazas $v < 0$ se kontraŭe (tial $g_{0\mu}\mathrm{d}x^\mu < 0$). Kaj okazas $|v| = \infty$ se la eventoj estas samtempaj ($\mathrm{d}T = 0$).

Se $c\,\mathrm{d}T > \mathrm{d}L$, tial $0 < v < c$, indikante ke objekto povas ekiri de punkto x^i de spaca reto en loka momento t kaj atingi punkton $x^i + \mathrm{d}x^i$ en loka momento $t + \mathrm{d}t$. Kaj se $c|\mathrm{d}T| > \mathrm{d}L$ sed $\mathrm{d}T < 0$, tial $-c < v < 0$, indikante ke objekto povas iri ekde $x^i + \mathrm{d}x^i$ en loka momento $t + \mathrm{d}t$ kaj atingi punkton x^i en loka momento t. En ambaŭ okazoj $\mathrm{d}t$ povas havi iun ajn signumon. Plue, (2), (19) kaj (22) oferas je

É claro que v depende do molusco. Como $\mathrm{d}L$ é sempre positivo, e $\mathrm{d}T$ pode ser ou positivo, ou nulo, ou negativo, então a velocidade (22) pode ter qualquer valor, $-\infty \leq v \leq \infty$. Ocorre $v > 0$ se $\mathrm{d}T > 0$, ou seja, se o evento $x^\mu + \mathrm{d}x^\mu$ for posterior ao evento x^μ (então $g_{0\mu}\mathrm{d}x^\mu > 0$), e ocorre $v < 0$ no caso contrário (então $g_{0\mu}\mathrm{d}x^\mu < 0$). E ocorre $|v| = \infty$ se os eventos forem simultâneos ($\mathrm{d}T = 0$).

Se $c\,\mathrm{d}T > \mathrm{d}L$, então $0 < v < c$, indicando que um objeto pode partir do ponto x^i da rede espacial no momento local t e atingir o ponto $x^i + \mathrm{d}x^i$ no momento local $t + \mathrm{d}t$. E se $c|\mathrm{d}T| > \mathrm{d}L$ mas $\mathrm{d}T < 0$, então $-c < v < 0$, indicando que o objeto pode partir de $x^i + \mathrm{d}x^i$ no momento local $t + \mathrm{d}t$ e atingir o ponto x^i no momento local t. Em ambos casos $\mathrm{d}t$ pode ter qualquer sinal. Ademais, (2) e (19) e (22) dão

$$\mathrm{d}\tau = \sqrt{1 - v^2/c^2}\,|\mathrm{d}T\,|, \tag{23}$$

estante v la rapido de objekto en tiu molusko.

Se $c|\mathrm{d}T| = \mathrm{d}L$, tial $\mathrm{d}s = 0$, do lumsignalo povas konekti eventojn x^μ kaj $x^\mu + \mathrm{d}x^\mu$. Laŭ (22), la rapido de signalo havas modulon c. La signalo iras de x^i al $x^i + \mathrm{d}x^i$ se $g_{0\mu}\mathrm{d}x^\mu > 0$, kaj en la mala direkto se $g_{0\mu}\mathrm{d}x^\mu < 0$.

Fine, se $c|\mathrm{d}T| < \mathrm{d}L$ tial (22) indikas ke $|v| > c$: neniu objekto kaj neniu lumsignalo povas konekti la eventojn. Speciale, se $\mathrm{d}T = 0$ kun $\mathrm{d}L \neq 0$, tial (22) indikas $|v| = \infty$.

sendo v a velocidade do objeto nesse molusco.

Se $c|\mathrm{d}T| = \mathrm{d}L$, então $\mathrm{d}s = 0$, portanto um sinal luminoso pode conectar os eventos x^μ e $x^\mu + \mathrm{d}x^\mu$. Segundo a (22), a velocidade do sinal tem módulo c. O sinal vai de x^i para $x^i + \mathrm{d}x^i$ se $g_{0\mu}\mathrm{d}x^\mu > 0$, e no sentido contrário se $g_{0\mu}\mathrm{d}x^\mu < 0$.

Finalmente, se $c|\mathrm{d}T| < \mathrm{d}L$ então a (22) indica $|v| > c$: nenhum objeto e nenhum sinal luminoso pode conectar os eventos. Em particular, se $\mathrm{d}T = 0$ com $\mathrm{d}L \neq 0$, então a (22) indica $|v| = \infty$.

7 En kurbo

Kurbo en spacotempo estas rompebla je pecoj. Peco esta nomita *de tempa tipo* (aŭ de nula tipo, aŭ de spaca tipo) se ĉiu infinitezima intervalo de tiu peco estas de tempa tipo (aŭ nula, aŭ spaca, respektive). Peco de tempa aŭ nula tipo estas direktebla laŭ plieganta T, kaj tiu direkto ne varias per ŝanĝo de molusko. Ankaŭ peco

7 Em uma curva

Uma *curva no espaçotempo* pode ser partida em pedaços. Um pedaço é dito do tipo tempo (ou do tipo nulo, ou do tipo espaço) se todo intervalo infinitesimal desse pedaço for do tipo tempo (ou nulo, ou espaço, respectivamente). Um pedaço do tipo tempo ou nulo pode ser orientado segundo T crescente, e essa orientação não varia sob mudança de molusco. Também um pedaço de spaca tipo estas tiel direktebla, sed direkto povas varii per ŝanĝo de molusko.

Estu du eventoj E_1 kaj E_2, finie apartitaj. En Newtona mekaniko, la tempa apartigo inter ili estas simple $t_2 - t_1$, kaj la spaca apartigo estas simple $|\vec{x}_2 - \vec{x}_1|$. En speciala relativeco la temo estas pli subtila, ĉar ambaŭ apartigoj pendas de la inercia referencosistemo ke oni uzas. Kaj en molusko de Einstein la temo estas ankoraŭ pli subtila.

Finia apartigo estas sumigo de infinitezimaj apartigoj. Ni jam difinis du malsamajn infinitezimajn tempajn apartigojn: propran intertempon $\mathrm{d}\tau$ kaj intertempon $\mathrm{d}T$. Kaj ni difinis ankaŭ du malsamajn infinitezimajn spacajn apartigojn: propran distancon $\mathrm{d}\lambda$ kaj distancon $\mathrm{d}L$. Do ni havas 4 malsimilajn finiajn apartigojn por konsideri. Tiuj apartigoj estos difinataj laŭ iu elektita kurbo en spacotempo. Atentu ke estas nefinia nombro de kurboj de spaca tipo kunigante du iujn ajn eventojn. Sed eble ne ekzistas kurbon de nula tipo, aŭ de tempa tipo, por fari tion.

